

GENETIKA GRAMATIKO

La briko de la lingvoj estas la vorto. La brikoj faras la muron de la lingvoj, kiu estas la lokucio. La muroj de la lingvoj faras la etaĝon, kiu estas la sentenco. La etaĝoj de la lingvo faras la domon, kiu povas esti nur unuetaĝa, duetaĝa kaj eĉ pluretaĝa.

En la komenco estis la Verbo, kaj la Verbo estis kun la lingvo, kaj la Verbo estis la lingvo. Tiu estis en la komenco kun la lingvo. Ĉio estiĝis per li, kaj aparte de li estiĝis nenio, kio estiĝis. En li estis la vivo, kaj la vivo estis la voĉo de la homoj. Kaj la voĉo brilas en la malvoĉo, kaj la malvoĉo lin ne venkis.

La Verbo estas multforma, ĉar li povas metamorfoziĝi por akiri alian sencion krom la originala kaj konstanta:

dormi	=	fakto tempindiferenta: dormostato
dormas	=	dum la vortigo pri dormo: estanta fakto [dum la parolo]
dormis	=	antaŭ la vortigo pri dormo: pasinta fakto [post la parolo]
dormos	=	post la vortigo pri dormo: venonta fakto [antaŭ la parolo]
dormus	=	ebla fakto, sed ne certa
dormu	=	deviga dormostato

Unu sola el tiuj verboformoj estas unusenca koncerne la tempon kaj dusenca koncerne la fakton: la estinta. Efektive, ĉia is-formo nepre indikas ion pasintan, sed tio pasinta povas esti jen nefinita fakto, sekve tiam okazanta [estanteco en pasinteco], jen finita fakto, sekve tiam okazinta [estinteco en pasinteco]. Tia sencodiverseco estas markata en la Franca Gramatiko de la propra Fundamento de Esperanto [miaj aspektigo kaj traduko]:

vi faris: 1. vous faisiez [vi estis faranta]. 2, vous avez fait [vi estas farinta].

Ni konstata tiajn diferencojn:

La pasintan nokton li dormis, kiam eniris rabisto [estanta dormo].
La pasintan nokton li dormis nur du horojn, kaj ellitiĝis [estinta dormo].

Kaj estas eĉ io pli drasta kaj kontrasta:

Dum li mortis, ĉiuj angore rigardis lin [dum li estis mortanta...].
Kiam li mortis, ĉiuj ekploris [kiam li estis mortinta...]....

En unu el la postaj alineoj, mi klarigos, kial mi ne povas fari por la unua paro [estis dormanta / estis dorminta] tiun saman klarigon, kiun mi prezentis por la dua [estis mortanta / estis mortinta]: surprizo atendas mian geleganton!

Spite de liaj ses formoj, la Verbo sentis sin soleca [pro mia Deino: senti sin soleca estas soeco...], ĉar li estis sola, kaj li sopiris pri kompanio. Sola, li povis voĉi ŝajne pri nenio. Tiam li inventis la nomon, kaj per tio estiĝis klasoj de verboj [x: sub la regado de]:

1-a klaso: -o de -i [nomo x verbo].

- Bebo dormas.
- Vento ventas.
- Pluvo pluvas

2-a klaso: -o kaj -o de -i [nomo + nomo = 1 x verbo].

- Viro estas homo [viro kaj homo: sola estanto].

3-a klaso: -o kaj -o de -i [nomo + nomo = 2 x verbo].

- Virino vidas bebon [unu vidanto kaj unu vidato: du homoj].
- Kato kaptis muson [unu kaptinto kaj unu kaptito: du bestoj].
- Roko detruos muron [unu detruonto kaj unu detruoto: du aferoj].

La nomo vidis la verbon ĝoja pri liaj pluraj eblecoj kaj lin enviis: granda ĵaluzo! Ĝi tuj volis fari al si similan kompanion kaj do inventis la adjektivon:

- Laca bebo dormas.
- Eleganta virino estas agrabla homo [virino + homo = 1].
- Dento de leono estas akra dento [dento + dento = 1].
- Amema patro vidas belan infanon [patro + infano = 2].
- Rapida kato kaptis senatentan muson [kato + muso = 2].
- Granda roko detruos dikan muron [roko + muro = 2]

En tiu momento, la Verbo divenis eksterordinaran regulon, kiun li nomis neceso kaj sufiĉo. Antaŭ sia eltrovo, li devus vortigi jene:

- Vento ventas [laŭ la 1-a klaso].
- Pluvo pluvas [laŭ la 1-a klaso].
- Eleganta virino estas agrabla homo. [laŭ la 2-a klaso].
- Dento de leono estas akra dento. [laŭ la 2-a klaso].

Post tia granda eltrovo, kiun li nomis elipso, ĉio fariĝas pli facila kaj oportuna:

- Ventas.
- Pluvas.
- Eleganta virino estas agrabla.
- Dento de leono estas akra.

La Verbo observis, ke ofte li devis ripete paroli pri la sama homo, pri la sama besto, pri la sama planto kaj pri la sama afero: kian tedan multigon de nomoj li devas elteni! Post Deina sonĝo, li inventis la pronomon:

- Li estas viro.
- Ŝi estas virino.
- Ĝi estas muso.
- Mi estas Verbo, li diris al si mem!
- Ci estas nomo, li diris al la nomo!
- Vi estas nomo kaj pronomo, li diris al ili.

- Ni estas vortoj, li diris al la siaj.
- Oni mallongigas la frazon.

Ĉio ŝajnas ege trankvila, kiam la adjektivo sentis sin deprimita: la Verbo kreis la nomon kaj la pronomon, la nomo kreis la adjektivon, sed kion kreis la povra adjektivo? Ĝi do pensis kaj pensis, kaj inventis la adverbos:

- Mi estas vere inteligenta! Ve al aliaj, kiuj sen mi mutas, balbutas aŭ vortogutas!... Sen mi la mondo havus nenian koloron kaj nenian formon: nur mi priskribas kaj desegnas!

En la unua momento, la Verbo iom nervoziĝis, sed tuj poste li komprenis, ke li estas la sola esenca elemento de ĉia vortigo:

- Mi vere regas vastan kvanton da vortoj... Aliaj nur subregas!

Li do rekomencis krei multajn frazojn, ĝis li misglutis unu el la lastaj, kiun li devis restis nekompleta:

- Azeno portas pezan sakegon.

Li subite komprenis, ke ne estas eble indiki originon, destinon kaj vojon, kiujn la porto ostulas. Post mil unu nokto da pensoj, li kreis unue la manieron demandi:

Kiel mi indikos komencon, kaj finon kaj interspacon?

Post malmulta tempo li difinis la tuta tabelon de la korelativoj, sed la porto ankoraŭ restis sen komforto. Fine li konstruis la unuajn prepoziciojn:

- Azeno portas ion de ie al ie tra ie....

Kaj nova ekpenso fulmis tra lia kapo, kaj li diris de si al si mem:

- Nomoj kaj pronomon okupas la saman lokon apud mi, kaj ili do havas la saman rajton kaj meritas aparteni al la sama klaso: substantivoj ili estos! Mi regas la substantivon, kiu regas la adjektivon, kiu regas la adverbos... Mi devas etendi mian imperion kaj por tio mi nun konstruos el mi mem substantivon, el mi mem adjektivon kaj el mi mem adverbos unuj por la antaŭverbaj kaj aliaj por la postverbaj formoj.

Al ĉiu Verbo de la 1-a kaj 2-a klasoj respondas naŭ participoj *subjektaj*, pli bona esprimo ol *aktivaj*:

dormanto = homo dum la dormo
 dorminto = homo post la dormo
 dormonto = homo tuj antaŭ la dormo

dormanta = dumdorma [homo]
 dorminta = Postdorma [homo]
 dormonta = antaŭdorma [homo]

dormante	=	dumdorme [labori]
dorminte	=	Postdorme [labori]
dormonte	=	antaŭdorme [labori]

Al ĉiu Verbo de la 3-a klaso respondas por la o-vorto naŭ partocipoj subjektaj kaj por la on-vorto aliaj naŭ partocipoj *objektaj*, pli bona esprimo ol *pasivaj*:

nutranto / nutrato	=	[virino] dum la nutro / [bebo] dum ĝia nutriĝo
nutrinto / nutrito	=	[virino] post la nutro / [bebo] post ĝia nutriĝo
nutronto / nutroto	=	[virino] tuj antaŭ la nutro / [bebo] tuj antaŭ ĝia nutriĝo
nutranta / nutrata	=	dumnutra [virino] / dumnutriĝa [bebo]
nutrinta / nutrita	=	postnutra [virino] / postnutriĝa [bebo]
nutronta / nutrota	=	Antaŭnutra [virino] / antaŭnutriĝa [bebo]
nutrante / nutrate	=	dumnutre [ĝui] / dumnutriĝe [alkuri]
nutrinte / nutrita	=	postnutre [memorii] / postnutriĝe [plori]
nutronte / nutrote	=	antaŭnutre [sopiri] / antaŭnutriĝe [voki]

La 22-a paragrafo de la Fundamento de Esperanto sufiĉe bone pravas, ke mi pravas pri miaj ideoj pri la senco de miaj partocipoj:

Fluanta akvo [dum la fluo: dum ĝi fluas] estas pli pura, ol akvo staranta senmove [dum la staro senmova]. — Promenante [dum la promeno: dum mi promenis] sur la strato, mi falis. — Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto [homo dum la bato: dum li batas] kaj Jozefo estas la batato [homo dum la bato: dum lin batas]. — Al homo, pekinta senintence [post peko senintencita], Dio facile pardonas. — Trovinte [post la trovo: post kiam mi trovis] pomon, mi ĝin manĝis. — La falinta homo [post la falo: post ol li falis] ne povis sin levi. Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem plimulte meritas riproĉon; li estas nur unufoja mensoginto [homo post unufoja mensogo] dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [homo dum mensogado]. — La tempo pasinta [post la paso] jam neniam revenos; la tempon venontan [antaŭ la veno] neniu ankoraŭ konas. — Venu, ni atendas vin, Savonto [homo antaŭ la savo] de la mondo. — En la lingvo "Esperanto" ni vidas la estontan lingvon [antaŭ la esto] de la tuta mondo. — Aŭgusto estas mia plej amata filo [dum la amo: dum lin amas]. — Mono havata [dum la havo: dum oni ĝin havas] estas pli grava ol havita [post la havo: post ol oni ĝin havis]. — Pasero kaptita [post la kaptito] estas pli bona, ol aglo kaptota [antaŭ la kaptito]. — La soldatoj kondukis la arestitojn [homoj post la aresto] tra la stratoj. — Li venis al mi tute ne atendite [post nenia atendo]. — Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto [homo antaŭ la juĝo].

La granda prestiĝo de la Akademio de Esperanto en la sesdekaj jaroj influis la akcepton de la falsaj ekvacioj proponitaj de J. R. G. Isbrücker (1889-1967), kiu prezidis la Akademion inter 1937 kaj 1963:

-anta = kiu -as

-inta = kiu -is
-onta = kiu -os

-ata = kiun (oni) -as
-ita = kiun (oni) -is
-ota = kiun (oni) -os

Ekzemploj pruvas, ke tiuj ekvacioj estas plene falsaj:

Ravas ŝin viro kantanta arion. = Ravas ŝin viro, kiu kantas arion.
Ravis ŝin viro kantanta arion. = Ravis ŝin viro, kiu kantis arion.
Ravos ŝin viro kantanta arion. = Ravos ŝin viro, kiu kantos arion.

Ravas ŝin ario kantata de viro. = Ravas ŝin ario, kiun viro kantas.
Ravis ŝin ario kantata de viro. = Ravis ŝin ario, kiun viro kantis.
Ravos ŝin ario kantata de viro. = Ravos ŝin ario, kiun viro kantos.

Mi forte bedaŭras, sed la dua linio de ĉiu triopo de la dua kolumno estas dusenca ekster kunteksto, ĉar tie aperas estinta verboformo, kiun la propra Fundamento de Esperanto karakterizas tia. Sekve, ili povas havi duan interpreton:

Ravis ŝin viro kantinta arion. = Ravis ŝin viro, kiu kantis arion.
Ravis ŝin ario kantita de viro. = Ravis ŝin ario, kiun viro kantis.

Efektive, se mi diras, ke viro kantis arion, mia kunparolanto scias nur, ke temas pri fakto jam pasinta, sed mi devus klarigi, kiun el la du eblecoj mi informas: 1. dum li kantis [kantanta / kantata]. 2. post ol li kantis [kantinta / kantita].

Ni do senĝene akceptu, ke la ekvacioj de Isbrücker vere estas tute senutilaj, ĉar la sencoj de la participoj estas multe pli larĝaj, ol li supozis:

-anta: kiu -as
kiu -is
kiu -os

-ata: kiun oni -as
kiun oni -is
kiun oni -os

Kaj mi nun klarigu la diferencon inter la faktoj dormi kaj morti, sed ilia distingo havigas al ĉiuj verboj apartenecon al unu el tiuj du verboklasoj, eventuale samtempe al ambaŭ, sed kun apartaj sencoj.

Al la unua klaso apartenas la verboj, kiuj indikas fakton, kiu fluas, pluas kaj kontinuas: statoverboj. Iliaj faktoj karakteriziĝas per tio, ke ilin interrompi kaj ilin fini havas egalan rezulton: se mi interrompas ies dormon, li ne plu dormas, kaj se mi finas ies dormon, li ne plu dormas... La malagrabra sekvo estas tio, ke ilia estinta participo ekzistas, sed havas ordinare absurdan sencon, kiu baras ilian uzadon:

Akompaninta: post la akompano, sekve ne plu akompanata kaj do sola.
Akompanita: post la akompano, sekve ne plu akompanata kaj do sola.
Bezoninta: post la bezono, sekve ne plu bezonata kaj do nenecesa.
Bezonita: post la bezono, sekve ne plu bezonata kaj do nenecesa.
Dorminta: post la dormo, sekve ne plu dormanta kaj do vekita aŭ vekiginta.
Vivinta: post la vivo, sekve ne plu vivanta kaj do mortinta.

Al la dua klaso apartenas la verboj, kiuj indikas fakton, kiu havas komencon kaj finon: agoverboj. Iliaj faktoj karakteriziĝas per tio, ke ilin interromi kaj ilin fini havas malegala rezulto: se mi interrompas konstruon kaj se ĝin finas, mi havas apartajn rezultojn...

Pro influo de naciaj lingvoj, kelkaj verdaj verboj apartenas samtempe al la du verboklasoj:

kovri₁: meti kovraĵon [dua klaso]
kovri₂: teni kovraĵon [unua klaso]

Sufiĉas apliki la regulojn pri la tri prepozicioj, kaj ĉio iros plej glate:

post la meto de kovraĵo: kovrita [kun kovraĵo]
post la teno de kovraĵo: kovrita [sen kovraĵo]

Helpu nin Zamĉjo kaj Deino!

La distingo de tiuj klasoj tamen ne estas grava por la uzo de la participoj, ĉar iliaj sencoj estas adekvate donataj per la tempaj prepozicioj: 1. *dum* por la estantaj. 2. *post* por la estintaj. 3. *antaŭ* por la estontaj.

Ni do reproduktu per vortogrupo la sencon de la unuvorta participo kaj poste demandu:

Interesita: post la intereso.
Kio okazas post la intereso?
- La foresto de intereso.

Sekve de tio, la vorto *interesita* diras ion ne agrablan: ne plu interesata...
Kaj venas dolora demando:

- Kial plenaj posedantoj de Esperanto maltrafas la ĝustajn participojn, precipe per la trouzo de la estinta en teksto, kiu petas la estantan?

Estas pluraj respondoj:

1. Ne estas ilia kulpo, ĉar mankis ĝis nun adekvataj reguloj, kvankam neniu kredas al ili: triamonda sudamerikano?!...

2. La instruo mem de la participoj estas erariga de tio, ke la instruistoj ekiras de la falsa ideo, ke participoj estas io verba. La ekvacioj de Isbrücker estas pesima ekzemplo kaj pruvo...

3. Escepte de la latinidaj, aliaj hind-eŭropaj lingvoj aludas la pasintecon sen ia distingo inter io okazanta en la pasinteco [imperfekto: daŭranta fakto] kaj io okazinta en la pasinteco [perfekto: finita fakto].

4. Multaj okcidentaj lingvoj, inter ili la latinidaj kaj la ĝermanaj, havas participojn estantan kaj estintan, sed unusolan vorteron por ambaŭ, kaj tial ili neglektas iliajn verajn sencojn. Mi ekzemplas per la portugala:

amado: amata
marcado: markita

5. Konfuzas nin la tro granda riĉeco de Esperanto per siaj participoj, kaj ni havas nenian apogon por tio en niaj denaskaj lingvoj kaj baraktas en niaj ondoj: analogan malfacilecon trovas parolanto de lingvo sen kazoj aŭ sen artikolo...

Ni tamen ĉiam memoru, ke estas esenca diferenco inter tempa verboformo kaj la respektiva participo, cxar ĉiu el ili indikas epokon, sed sub malegalaj deirpunktoj: tempaj verboformoj koncernas la parolon, dum la participoj indikas la momenton de la fakto. Tiuj du perspektivoj esence diverĝas [1 – estanta formo . 2. estinta formo. 3. estonta formo]:

Verboj:	Participoj:
1. dum la parolo okazas	1. dum la fakto okazis, okazas, okazos
2. antaŭ ol la parolo okazas	2. post ol la fakto okazis, okazas, okazos
3. post ol la parolo okazas	3. antaŭ ol la fakto okazis, okazas, okazos

Mi profunde lamentas, ke neniu kredas min, sed participoj estas sentempaj vortoj, parencoj de la ordinaraj substantivoj, adjektivoj kaj adverboj derivitaj de ili, kies sencoj ne dependas de rilato al la nuna momento, kiu kreas la estantecon, la pasintecon kaj la venontecon.

Teksto de novembro 2006:

Pri la estantaj kaj estintaj pasivaj participoj, mi povas nun ekzempli per akcidento en mia nuna vivo: post nelonge mi estos paciento de kirurgo.... La ekzemploj klare demonstros la diferencon inter tiuj participoj, ĉe kiuj la plejmulto de la esperantistoj simple uzas la estintan pasivan tie, kie pli bone estus la estanta. Pri mi mem mi povas nun diri:

- Nun mi devas esti operaciata. Kiam mi estos operaciata, kirurgo, anestezisto kaj flegistinoj ĉirkaŭos min. Kiam mi estos operaciita, mi reiros hejmen.

Averto de Decembro 2007:

Dank' al la protekto de mia Deino la operacio ne efektiviĝis, ĉar ŝi kuracis min per simplaj medikamentoj, kaj mi estas nun tute sana ...

Geraldo Mattos